

Marjorie Boulton (1924–2017): el “Kontralte” (1955)

NENASKOTAJ INFANOJ

Infanoj la plej malbonaj
Estas nenaskotaj –
Neŭrozaj, aŭ frenezaj, idiotaj,
Mortaj, senkarnaj, ŝtonaj.
Ili tiras la manon
De sola virino.
Ŝi sentas infanon.
Sub virina retino.
Ilia imago
Kreskas kvazaŭ malsano
Aŭ blindiga paralizo.
La naskito
Neniam estas tia infano.

Amo devas esti ago.

Infanoj nenaskotaj
Virinojn vekadas
Aŭ per manetoj narkotaj
Kaj spiro de kloroformo
En songoplana, abomena dormo
Ilin enbarikadas.
Solaj virinoj estas monda plago.
Ni ne tro parolu
Pri la penso
De sola virino;
Ni ne multe konsolu
La koron; la sino
Estas malplena
Ĉio gangrena
Putras en menso.

Amo devas esti ago.

Nenaskotaj infanoj
Estas diabloj fosforeskaj,
Neniam iĝas adoleskaj,
Neniam maturaj.
En la infere varmaj korvulkanoj,

Tiu ĉi lafa lago,
Infanoj malpuraj
Plorkrias, fekas kaj koleras;
Kaj la malsana koro degeneras.
Tiaj infanoj estas monstraj fruktoj
Do ombra utero,
Naskitaj pro inferaj songoluktoj,
Kaj ne post naŭ monatoj,
Sed pli rapide ol ratoj
Per hontigaj akuŝoj,
El la kor-kratero.
Kaj ili mortas kiel muŝoj.
Deziro!
Disŝiro!

Amo devas esti ago.

MIA AMPREĜO

Min amu iom, ĉar mi ne meritas,
Kaj, ĉar mi ne meritas, mi bezonas;
Mi scias ke al vi nenion donas
Donindan mi, nenion mi oferas,
Nur amas, ardas solas kaj suferas.
Mi nur al malavaro vin invitas;
Min amu iom, ĉar mi ne meritas.

Nur iom, iomete, ian eron
Da amo, ŝparu nur ameron flavan,
Ion eksmodan, difektitan, favan,
Jes, ian elĵetaĵon, ion ruban,
Ion nebulan, fuman palan, nuban;
El via vasta vito, donu beron;
Nur iom, iomete ian eron!

Min amu iomete, malavara –
Donu parfumon nur de via rozo,
Aŭ velkitaĵon donu por almozo;
Min amu iom, car mi ne meritas,
Kaj mian malmeriton preĝe spitas:
Min amu iom pro kompato, kara;
Min amu iomete, malavara.

DOLORO

Ekflugu do, pasero,
Rekte al mia kara,
Diru, ke nun utero
Fluas per sang' amara
Sed pli amara koro
Eksangas pro memoro.

Ekflugo do por diri
Ke bone mi komprenas
Ke devas li foriri
Kaj sola mi ne svenas ;
Ne, ne, mi nur suferas,
Kaj vivon mi toleras.

Diru, ke mi pardonas,
Kaj sentas min malinda;
Pardonon mi bezonas,
Kaj amo estas blinda,
Kaj li ne estas vulpa,
Perfida – sed senkulpa.

SOLECO

Sen seksa juko homo povas sidi;
Ni povas trolabori, aŭ bromidi.

La karno povas vivi tute sole,
Sen ajna tuŝ' tenera aŭ konsola

En frosta lito sen elektra tremo,
Kaj, plie, sen amika varm' nek manpremo,

Sen ia ajn kareso karna, homa,
Onklina kis' formala, stacidoma,

Kaj iel, certe, kvankam altakoste,
Ni povas vivi ciam karnofroste.

Sed ĉiam ni sopiras al satigo
Alia, per la intelekta ligo,

Trovi, en nia fora alieco,
Ian estajon de la sama speco!

Ho sola, stela viv', sen aliancoj,
Vivo de nigra spaco kaj distancoj!

Kial mi tiel pensas pri intimo,
Mi, sola kiel stel' en malproksimo?

Kuraĝajn stelojn povas mi adori...
Ĉar mi neniam aŭdis stelon plori.

STURNOJ

Trankvilaj arbprofiloj.
Subita flugo migra.
Dekoj da sturnoj.
El poplo. Turnoj.
Arbo ekflamis. Torĉo nigra,
Flagro deflugiloj.

PRESKRIBO

Ĉu povas vi preskribi, ho doktoro,
Ion por mia malplenega koro?
Certe, fraŭlino. Prenu revolveron
Plenigu per plumberoj la krateron.
Dankon, doktoro. Jes, vi havas saĝon,
Sed mia kor' ne havas kuraĝon.